Dekunua jaro :: N-ro 18 :: Julio 1959

# La Voĉo de Kongreso

Eldono okaze de la 32a kongerso de Sennacieca Asocio Tutmonda :: Dortmund :: 1a — 7a de aŭgusto 1959



## Saluton al la kongresanoj!

**Kun granda ĝojo mi salutas la gepartoprenantojn de la SAT-kongreso en la nomo de la urbo Dortmund.**

**Vi kongresas en domo, kiu por la spirita kaj kultura vivo de nia urbo havas grandan signifon, kaj mi deziras al la kongreso la bonan fluidon de ĉi tiu domo, tiam la sukceso estos certa.**

**Mia konvinko estas, ke vi en nia urbo trovas simpation por via idealo.**

**Mi scias, ke ĉiu SAT-kongreso plifortigas la interfratiĝon de la popoloj kaj havas la altan celon, servi al la paco en la mondo. Estas streĉa laboro, kiun la Esperantistoj faras, sed la celo ankaŭ estas sufiĉe inda.**

**Mia deziro al la kongreso estas, ke ĝi estu forta voko por la Esperanto-movado kaj donu al la kongres-gepartoprenantoj la konvinkon, ke ili fosas gravan sulkon por la paco en la mondo.**

**En tiu senco mi tutkore salutas vin kaj deziras, ke la Esperanto-movado iru feliĉe supren.**

Ĉefurbestro

**SAT-Junulfako**

**De la 8-a ĝis la 14-a de aŭgusto ni kunestos en la Naturamika Domo „Am Sommerhagen" en Stöcken ĉe Breckerfeld, atingebla per aŭtobuso de Dortmund. Prizorganto estas kamarado A. Ballauer, Postfach, Hagen, Germanio.**

## Dortmund bonvenigas vin

Dortmund, grandurbo kun pli ol 600 000 loĝantoj, vastspace etendiĝas al multaj antaŭlokoj, havantaj siajn proprajn dense loĝigatajn kernojn. Spite al ĝia industria kaj grandurba aspekto, ĝi multloke konservis ankoraŭ kamparan karakteron, kie precipe minejlaboristoj posedas ankoraŭ sian bieneton hereditan de siaj kamparanaj prapatroj.

Ideon pri la amplekso de tiu vasta areo (271 430 000 da kvadrataj metroj) kun 40 pli aŭ malpli grandaj lokoj donas al vi la trafika reto, vidigata sur la malantaŭa paĝo de la urbmapo, kiun vi ricevas kun ĉi tiu gazeto. La fokuso de la peza industrio troviĝas ĉefe en la norda kaj okcidenta partoj de la urbo. En la okcidento la relative dense lokitaj 13 minejoj formas kun la cetera Ruhr-regiono kvazaŭ seninterrompan ĉenon. La granduzinoj ŝoviĝas norde kaj okcidente al la rando de la urbkerno. Krome troviĝas unu uzino en la sudo. En la mapo (kiu montras nur la urbkernon) la uzinoj estas parte videblaj. Ili estas signitaj per kamentuboj.

### Kulmino de urba prospero

Jam en la jaro 890 la urbo estis unuafoje menciita, sed ŝtonaj atestantoj kiel la ruinoj de la saksa fortikaĵo Hohensyburg kaj multaj historiaj elfosaĵoj evidentigas ĝian ekzistadon jam multajn jarcentojn antaŭ tiu dato. En la sekvintaj jarcentoj Dortmund inter la Hanso-urboj havis gvidan pozicion. Ĝia komerca influregiono etendiĝis de Bruĝo al Novgorodo. Plurfoje la anglaj reĝoj eĉ pruntedonis al dortmundaj komercistoj siajn kronjuvelojn kiel garantiaĵon por ricevi krediton. La kulmino de la urba prospero estis ĉirkaŭ la jaro 1350, kiam la urbo nombris 17 000 loĝantojn. La tiutempe plej granda urbo Kolonjo havis 20 000 loĝantojn. Sed longdaŭraj militoj, la dortmunda kaj la Soest-a „Fehden" (malpacoj) kaj la 20 jarojn daŭranta pesto en la 15-a jarcento kaŭzis longdaŭran regreson kaj duoniĝon de la loĝantaro. Nur dum mallonga periodo estis eble al la urbo kolekti novajn fortojn, kiam la tridekjara milito (1618—48) denove mizerigis la urbon premante la loĝantaron ĝis plena elĉerpiĝo. Je la fino de tiu milito la urbo similis ruinejon. La loĝantaro estis ŝrumpinta al 2000. Komence de la 19-a jarcento ankoraŭ perdiĝis la regnolibereco. Dortmund estis fariĝinta malgranda provincurbo. En la jaro 1839 ĝi nombris 4000 loĝantojn.


Komparo kun apudaj lokoj montras la sensignifan pozicion kaj mizeriĝon de la iama prospera Hanso-urbo: Münster ĉirkaŭ 15 000, Soest kaj Iserlohn ĉirkaŭ 5200 kaj Hamm 4700.

### Centro de la peza industrio

Sed baldaŭ komenciĝis la giganta karbekspluata entrepreno en la karbodistrikto kaj paralele kun ĝi la instalo de fabrikoj kaj la funkciigo de grandfornoj. Dortmund nun rapide rekreskis, evoluante en la daŭro de duona jarcento al ĉefurbo de la peza industrio, tiel rememorigante al sia prospera estinto kiel libera regnourbo. Komence de nia jarcento la amplekso de la industrio en la dortmunda spaco estis tiom pliiĝinta, ke montriĝis utile konstrui propan akvovojon al la norda maro. Tiamaniere estiĝis la Dort-

La Vestfalia Halo en Dortmund estas la plej granda halo de Eŭropo.





La Fritz-Henssler-Haus estas la centro por la spirita kaj kultura vivo de Dortmund. En tiu ĉi moderna domo ni kongresos.

mund-Ems-kanalo, interliganta la urbon kun la marhaveno Emden. Ĉi tiu kanalo kune kun tre densa fervoja reto akcelis kaj efektivigis en sekvintaj jardekoj tian kunamasiĝon de ĉiuspecaj industriaj branĉoj en la dortmundan spacon, ke sentiĝis la bezono likvidi tiujn memstarajn malgrandajn komunumojn troviĝantajn en la daŭre disvastiĝanta industria influregiono kaj meti ilin sub unu komunan administradon. Tiu proceso komenciĝis en 1905 kaj daŭris ĝis 1928.

## Grandaj bierfarejoj

Sed la grandfornoj kaj minejoj ne estis la sola kaŭzo por la miriga antaŭeniĝo al industria grandurbo. Kiel tria, ne malpli grava faktoro aldoniĝas ankoraŭ la bierproduktado. Jam depost 1293, kiam al la dortmundanoj estis koncesiita la bierfara rajto, oni estis zorginta pri bonkvalita biero. Meze de la antaŭa jarcento la bierfara metio evoluigis la t. n. bavaran bierfarmetodon. Laŭ ĝi estis produktata (ĉefe per vapormaŝinoj) la „subfermenta" biero, kiu havas la avantaĝon konserviĝi pli longtempe, sekve esti pli taŭga por la eksporto ol la ĝis tiam produktita biero. El tio rezultis, ke la nombro da bierfaristoj daŭre malkreskis, dum la produktado pliiĝis. La ĉirkaŭ 1850 ekzistantaj 39 bierfarejoj, kiuj plejparte elkranigis sian produktajon en propra gastejo, iom post iom malpliiĝis. Hodiaŭ ekzistas ankoraŭ 7 modernaj grandbierfarejoj, kies produkto superas tiun de Munkeno je pli ol triono. El tiuj bierfarejoj 6 troviĝas sur la mapo. Ili estas markitaj per siaj propraj insignoj. (Ni notis tion por tiuj gekamaradoj, kiuj deziras viziti unu — aŭ eble plurajn — el la bierfarejoj.)

## Konforme al la moderna trafiko

Samtempe kun la rapida kresko al industria grandurbo iom post iom malaperis la atestantoj de la antikva urbhistorio. La remparo el la 12-a jarcento kun ĝiaj 7 pordegoj, turoj kaj fortikaĵoj devis cedi lokon al larĝaj stratoj kun promenejoj, kiuj post la milito

> La SAT-kolektiĝo en Vupertalo, Germanio, intencas okazigi semajnfinan renkontiĝon. Ili pretas montri al la vizitontoj la urbon kaj zorgi por tranoktejoj. Interesiĝontoj sin turnu al kamarado Albert Hang, Westkotterstr. 31, Wuppertal-Barmen, Germanio.

ankoraŭ plilarĝiĝis konforme al la moderna trafiko. Ili ĉirkaŭas la iaman antikvan urbon, havantan la formon de ovo. (Facile ekkoneblaj sur la mapo: Wall = remparo.) La antikva urbdomo kune kun multaj ŝtonaj dokumentoj detruiĝis dum la lasta milito. Inter la malmultaj postrestaĵoj de la antikva Dortmund estas unuavice menciinda la restaŭrita kaj parte rekonstruita Reinoldipreĝejo, kies impona eksteraĵo imagigas al la rigardanto la mezepokan prosperon de la Hanso-urbo, kvankam la preĝejo perdis jam en la 17-a jarcento sian originan grandecon. La en la jaro 1661 rekonstruita turo estas multe pli modesta ol ĝia antaŭulo, krom tio oni tiutempe rezignis rekonstrui tiun parton de la preĝejo, kiun frakasis la faleginta antaŭa turo. La supra parto de la turo en la lasta milito denove ruiniĝis, sed estis rekonstruita antaŭ kelkaj jaroj, ricevinte iom pli sveltan formon ol la antaŭa. (La preĝejo estas desegne vidigata sur la mapo.)

## Marko por la estonto

Ĉirkaŭ ĉi tiu impona konstruaĵo hodiaŭ grupiĝas novaj domoj, kies moderna arkitekturo sentigas al la rigardanto la fortan trajton de konscia estanteco kaj samtempe markas la firman volon, krei por la estonto indan reprezentaĵon.
Novaj, larĝaj stratoj ordigas la urbfiguron. Nur la ĉefstrato de la antikva urbo, la „Hellweg", konservis sian mezepokan mallarĝecon, sed ĝi distingiĝas per multaj hejmecaj biergastejoj, sur kies murpentraĵoj kaj multkoloraj fenestrovitraĵoj retiriĝis la antikva urbhistorio, al kiu multaj dortmundanoj ankoraŭ kroĉiĝas spite al la rapidemo nuntempa.
Inter la novkonstruaĵoj en la urbmezo estas menciindaj la 10-etaĝa urbdomo kaj la apude situanta administracia domo de VEW (unuiĝintaj elektrejoj vestfaliaj) kaj antaŭ ĉio la kultura domo (Fritz-Henssler-Haus), nia kongresejo. (La desegnaĵon de tiuj konstruaĵoj vi trovas sur la mapo.)

## La plej granda halo

Kio jam depost 3 jardekoj altiris ĉiujare milojn da homoj el ĉiuj partoj de la lando, eĉ el eksterlando, tio estas la kolosa okazigadcentro, la Vestfalia Halo, situanta ĉe la Ruhr-rapidvojo, la ĉefstrato de la Ruhrregiono. Ĉi tiu giganta halo, kies fera arkaĵo etendiĝas al elipso mezuranta en siaj aksoj 120 resp. 100 metrojn, estas la plej granda okazigadhalo de Eŭropo. Ĝi servas ne nur al sportaranĝoj, sed ankaŭ ĉiuspecaj amaskunvenoj kaj ekspozicioj estas okazigataj en ĝi. Al pli malgrandaj kunvenoj, prefere kulturokazigoj servas apude troviĝanta pli malgranda halo, al kiu aldoniĝas 2 ceteraj haloj, kiuj momente ankoraŭ estas konstruataj. Kun la sude troviĝantaj hotelo kaj restoracio kun 2 salonoj (en la pli granda okazos nia kultura vespero) ili konsistigas kun la subĉiela ruliĝkurejo la t. n. vestfalihalan terenon. Sude de ĉi tiu tereno troviĝas la stadiono kun la naĝejo kaj sunbanejo.

## Altlerneja kvartalo

La atenta rigardanto, kiu, forlasante la vestfalihalan terenon, preterpasas la Ruhr-rapidvojon norddirekten per la arkforma ponto, certe ne pretervidos la vicon da belaj konstruaĵoj, kiuj nun prezentiĝas al li. Tiuj 4 konstruaĵoj servantaj al la scienco konsistigas la „altlernejan kvartalon". La Max-Planck-Instituto por Laborfiziologio, kies esploroj serve al la laboranta homo estis tre fruktodonaj, ekzistis jam longe antaŭ la milito. La malantaŭa multetaĝa konstruaĵo estas nova. Apude troviĝas la Institucio por Socia Esplorado apartenanta al la Universitato de Münster, kiu lokis ĉi tiun gravan institucion ĉi tien por esti kapabla pli bone pristudi la problemojn meze inter la laborantaj homoj. Kiel tria konstruaĵo aldoniĝas la Social-akademio. Ĉi tie talentitaj laboristoj trovas okazon kleriĝi por pli altaj taskoj. Ĉi tiu instituto afable disponigis al ni lokon kiel komunloĝejon. La kvara konstruaĵo (tuj apud la ponto estas la Pedagogia Akademio. Lasttempe pli kaj pli urĝe sentiĝis la bezono por la instalo de teknika universitato aŭ altlernejo, ĉar la du ekzistantaj institucioj por la Ruhrregiona spaco (Aachen kaj Münster) tro malfavore situas por la multaj studentoj venantaj el Ruhr-regionaj lokoj.

## La nova simbolo

Sudoriente de la altlerneja kvartalo troviĝas tiu urboparto, kiu ĉisomere prezentos sin en sia plej bela vestaĵo allogante milojn da vizitontoj. Tie estiĝis el ĉiuspecaj konstruaĵoj (aŭtovojoj, pontoj, vastspacaj aŭtostarejoj kaj 3 multetaĝaj grandloĝdomoj) nova urboparto, kie ankaŭ la federacia ĝardenekspozicio sur tereno de 600 000 kvadrataj metroj estas okazigata. Ĉi tiun terenon — ja la tutan urbon — karakterizas 218 metrojn alta turo, kiu pro sia situo kaj impona alteco estas videbla de preskaŭ ĉiu parto de la urbo. Ĝi konsistas el 173 metrojn alta betontrunko, kies diametro mezurante malsupre 12 metrojn konusforme malpligrandiĝas, atingante en 133 metra alteco 5,5 metrojn. De tie ĝis la supro la trunko havas la formon de cilindro. Super la trunko estas fiksita 45 metrojn longa ŝtala surkonstruaĵo servanta kiel antena masto.
Por ke la leganto, vidante tiujn ciferojn, ne havu la impreson, ke estas ĉefe la emo al la superlativo, kiu determinis tian superaltecon, ni tuj aldonu, ke la celo de la turo estas duflanka. Unue ĝi vidigu al la rigardanto la funkcion de la ekspozicia tereno, interligi la grandurbon kun la sude situanta verda zono kaj prezenti al la rigardo la najbarecon kun la peza industrio. Kiel dua faktoro aldoniĝas, ke la poŝta administracio bezonas en la dortmunda spaco stacion por la transsendo de senfadenaj radiosignaloj. Ĉi tiu stacio devas esti lokata en alteco ebliganta al la direktitaj radiofoniaj ondoj senobstaklan komunikiĝon kun la respektivaj stacioj. Eĉ konsiderante la favoran situon de la turo, staranta jam sur altaĵo (la finbranĉo de la Ardey-montaro), montriĝis, ke tiu stacio devas esti lokata minimume en alteco de 150 metroj, se la suden direktigata ondo senobstakle atingu sian stacion en Wiblingswerde (surmonta vilaĝo en la Sauerland)

**Ni klopodis havigi al vi la gazeton sufiĉe frue antaŭ la kongreso, por ke vi havu okazon ĉion bone „digesti" kaj esti preparitaj por la kongresa semajno. Atentu niajn komunikojn en Sennaciulo. Detalojn vi trovos en la kongresdokumentaro, kiun vi ricevos tuj post via alveno en la akceptejo.**

La instalajoj por la sendstacio troviĝas en la supra, ĉirkaŭ la trunko troviĝanta ringforma elstarejo en alteco de 152 metroj. La 7 al la sendstacio apartenantaj faskojetaj antenoj havantaj la formon de paraboloido estas fiksitaj al la plej supra parto de trunko supre de la sendstacio. La diametro de ĉiu anteno mezuras 3 metrojn kaj ĉiu anteno pezas 6 funtocentojn. La malsupra, en alteco de 133 metroj troviĝanta ekstera elstarejo estas trietaĝa. En la dua etaĝo troviĝas restoracio, kies larĝaj fenestroj permesas al ĉiuj sidlokoj plenan superrigardon. Ĉi tiu etaĝo turniĝas ĉirkaŭ sia akso 2- ĝis 8-foje en la horo. La turniĝrapideco varias laŭ la bezono reguligi la temperaturon, kiun la unudirekta pli malpli forta sunradiado je la suda flanko pli malpli intense influas. Super la restoracio troviĝas du terasoj, permesantaj al 200 personoj ĉirkaŭrigardon. La unua etaĝo servas kiel kuirejo, temperaturreguligejo kaj necesejo. La trunko, kies funkcio estas porti la eksterajn elstarejojn kaj la antenojn, tenas en sia interno du liftojn kaj ŝtuparon. La rapideco de la du liftoj povantaj enteni entute 32 personojn estas 4 m/sek.


## Ekskursoceloj por niaj kongresanoj

Ĉio ĝis nun priskribita troviĝas en sufiĉa proksimeco al nia kongresejo. Ankaŭ la komunloĝejoj, kiujn la gekamaradoj trovos markitaj sur la mapo, estas facile atingeblaj de la kongresejo. Priskribante aliajn, pli malproksime troviĝantajn vidindajojn, ni limigas nin al tio, kio estas inkludata en nia programo kiel vizitcelo. Tio estas la suda periferio de nia urbo, la ŝatata ekskurscelo Hohensyburg. Ni atingos ĝin per la novkonstruita aŭtovojo. Baldaŭ la lastaj signoj de maldekstre troviĝanta uzino estas malaperintaj, kiam ni tra verdajoj supreniĝas al la plej alta punkto de la urbo nomata Höchsten, de tie sur la kontraŭa altajo jam estas videblaj la monumento kaj turo de Hohensyburg, kiun ni per ĉirkaŭvojo fine atingos. Ni nun staras sur historia tereno, kie la restajoj de la saksa kastelo Sigiburg memorigas pri la batalo inter Karlo la Granda kaj Widukind antaŭ pli ol 1200 jaroj.

## Akva forto kaj elektra energio

Tie ankaŭ finiĝas la dortmunda teritorio, tie prezentiĝas al nia rigardo la Ruhr-bendo kaj en la fono la komenciĝo de la Sauerland, nomata „Lando de la mil montoj". Maldekstre ni vidas la kuniĝon de la riveroj Ruhr kaj Lenne kaj iom dekstren la komenciĝon de la urbo Hagen, la pordo al la Sauerland. De tie oni atingos la Volme- kaj Ennepe-valoj, kie jam depost multaj jarcentoj floris la ferekspluata kaj -prilabora industrioj. Antaŭ la industriigo de la Ruhr-regiono la saŭerlanda industrio estis la sola en la tiama lando Prusio. Ĉi tie la fluanta akvo estis utiligata por funkciigi la muelilojn de la tiamaj ferprilaborantaj metiejoj. Ankoraŭ hodiaŭ en multaj intertempe moderniĝintaj fabrikoj tiuj malnovaj per akvo funkciigeblaj martelegoj estas troveblaj, per kiu dum generacioj la fero estis forĝita. Hodiaŭ tiu energifonto, la akvo, estas pli racie utiligata, estante transformata je elektra energio. La akvo de multaj riveretoj venantaj de la monto estas kolektata en grandaj artefaritaj lagoj, kiuj estiĝas per la konstruado de fortikaj retendigoj, kies tasko estas haltigi aŭ interrompi la riverfluon, altigante la akvosurfacon konforme al la alteco de la digo. Tiamaniere subakviĝis vastaj areoj kun kelkloke pluraj vilaĝoj. La multaj lagoj, kiujn la Sauerland posedas, plibeligas ankoraŭ tiun montaran regionon, kaj la harmonio kun la ĉirkaŭaj arbaraj montoj donas al la pejzaĝo ĝian propran ĉarmon. Tial ne estas mirige, ke en tiu regiono antaŭ duona jarcento la ideo de la junulgasteja verko povis evolui. El ĉiuj germanaj eĉ eŭropaj junulargastejoj tiu de Altena estas la plej fama.

Tiuj gekamaradoj, kiuj dum la duontaga ekskurso al Hohensyburg kaj la Hengstey-lago deziras daŭrigi de tie (post konvena restado) la ekskurson, havos okazon vidi unu aŭ plurajn el tiuj lagoj. Krome ni rekomendas al niaj junaj gekamaradoj partopreni la postkongresan renkontiĝon en la Naturamika Domo „Am Sommerhagen" situanta en bela regiono, kie kruciĝas pluraj migrovojoj. La panoramo, kiu prezentiĝas al ili de sur soleca altajo, estas neniel komparebla kun tiu de sur aŭtobusa sidloko.



218 metrojn alta estas tiu ĉi nova urba simbolo.

## La industria bezono rapide kreskas

La kaŭzo por la kunamasigo de tiuj grandegaj akvoamasoj en pluraj valoj de la Sauerland ne estas sole ĝia utiligo por akiri elektran kurenton. La fakto, ke la akvo de ĉiu rivereto venanta de la saŭerlandaj montoj fine enfluas la Ruhr-riveron, kiu estas la akvorezervujo por multaj Ruhr-regionaj industriurboj, kies akvobezono jaron post jaro pliiĝas konforme al la kresko de la industrio, instigis la respondeculojn antaŭzorgi, ke ankaŭ dum periodoj senpluvaj en la Ruhrvalo estu sufiĉe da akvo por sekurigi la akvokonsumadon de la Ruhr-urboj.

Pro sia situo Dortmund povas ĉerpi kiel unua el tiu komuna fonto. La dortmunda kompanio por akvoprovizado jam depost ĝia ekzisto klopodas liveri nur bonkvalitan akvon. Tial ĝi prenas la akvon ne rekte el la rivero, sed el multnombraj putoj troviĝantaj en la Ruhrvalo. Tiucele ĝi disponas pri vasta akvodona tereno laŭlonge de la Ruhr-valo etendiĝanta al distanco de 10 kilometroj. Ĉi tiu akvodona tereno do troviĝas ekster la urba teritorio kaj ekster la akvodislimo de la dortmunda spaco. La el la putoj kunmetita akvo estas pumpata al tri grandaj rezervujoj troviĝantaj sur altajoj de la Ardey-montaro (Höchsten), de kie ĝi estas kondukata al la pli malsupraj partoj de la urbo por esti konsumata. Necesas ankoraŭ aldoni, ke la bierfarejoj faras escepton, ili prenas sian akvon el propraj putoj.

Dortmund, via kongresurbo 1959, bonvenigas vin. Certe vi havos interesajn tagojn kun varia programo en la nunjara metropolo de laborista esperantismo. Partoprenu la kongreson kaj studu nian urbon. En tiu senco

**Saluton el Dortmund!**

Via OKK de la 32a

En la altlerneja kvartalo multaj sciencaj esploroj speciale servas al la laborantaj homoj.



La plej junaj kongresantoj loĝos en tiu ĉi junularhejmo. Jen nenio mankos al niaj geknaboj.



## Nia tuttaga ekskurso

**Lippe** estas miniaturŝtato en la Germana Federacia Respubliko. Tamen bonfama estas tiu landeto pro ĝia unika monumento, nomita „Hermannsdenkmal", kiu estas lokita en grandioza parto de la Teŭtoburga Arbaro (montara). Tiu monumento estas konstruita memorige al la finbatalo inter germana kaj roma armeoj en la jaro 9, kiam la germana Armin venkis la roman Varus post 4-jara batalado. Nun la monumenta Armin (Hermann) minacas la romanojn per kelkmetra glavo ne reveni al germanaj landoj. De tiu monumenta loko sur alta arbara monto oni havas belegan perspektivon ronde al ĉiuj direktoj. Neforgesebla estos tiu panoramo al la vizitinto! Dum nia rondveturado tra la Lippe-lando „Hermano" estas videbla ĉiam pli aŭ malpli proksime. Sed antaŭ ol ni povos tuŝi „lin" korpe, ni vizitos laŭvice aliajn celojn.

**Unua stacio** estos la banloko S a l z u f l e n , kiun ni atingos post 120-kilometra aŭtobusa veturado sur aŭtostrato. Vidinda tie estas la kolosa plektaĵo el dornaj branĉoj, tra kiuj de supre fluadas la sala akvo pumpita tien per tre antikva pumpsistemo. El kvar fontoj ŝprucas la saniga kaj varma akvo. La plej profunda fonto estas 1018 metrojn en la tero. Momente oni boras novan fonton, ĉar la klientaro pli kaj pli kreskas — eble kaŭze de la atomeksperimentoj!? Nu, tiu akvo ja helpos al suferantoj de koro-, sango-, spiro-, nervo- kaj reŭmatismo-malsanoj.

**Dua stacio** estos la ĉefurbo de Lippe, D e t m o l d , neniel suferinta urbeto dum la milito kun ĉ. 300 000 da loĝantoj. Meze de la urbo estas la renesanca kastelo de la iamaj regantoj — kaj gepatra domo de la nuna reĝina edzo nederlanda. Sendube la nederlandaj gekamaradoj interesiĝos pri la interno de tiu kastelo! Pluraj vidindaĵoj estas la iama palaco de la princa vidvino — nuna muzikakademio, antikva kvartalo, parkoj, muzeo k. t. p.

**Tria stacio** estos la „Externsteine", konsistantaj el 13 ampleksaj rokoj, el kiuj la plej alta mezuras pli ol 40 metrojn. Riskemuloj povos supreniri laŭ ŝtuparetoj. Religiemulojn certe interesos religia reliefo de 5-metra alteco, ĉizita en la rokon.

**Kvara stacio** estos la eksterordinara „Aglovartejo" sur ne tro alta monto en la idilia aerkuraca loko B e r l e b e c k. Nia alveno estas anoncita. Pri detalaĵoj vi aŭdos dum via vizito el la buŝo de la posedanto. Sed mi jam nun avertas: ne proksimiĝu tro al la agloj lokitaj ekstere!

**Kvina stacio** estos nia kara „Hermano", pri kiu mi parolis komence de ĉi tiu artikolo. 6 metrojn dikaj muroj formas la fundamenton de el kupro forĝita figuro. Ĝis meze de la soklo oni povas iri laŭ spirala ŝtuparo kun 75 ŝtupoj, interne de la soklo al ekstera verando ronde ĉirkaŭe. Nevolonte oni forlasas tiun belan panoramon de la varia pejzaĝo! Tial jam nun mi petas ĉiujn konduti discipline kaj bone aŭskulti kaj obei al la tempo fiksita en la diversaj stacioj por la plua ekveturo!

**Sesa stacio** estos en la ebena kaj sabla regiono „Senne", en S c h l o ß h o l t e , ĉe nia kamarado Dresselhaus, kiu pretas zorgi pri korpa kaj spirita nutraĵoj en sia domo, kiu entenas grandan salonon, ĉambreĝojn, keglejon, bonan humoron kaj — komprenebla — ankaŭ „fluidan panon"!


De tie ni aŭtobusos Dortmundon (eble laŭ alia vojo ol la matene uzitan). Plenan ĝuadon deziras al ĉiuj partoprenontoj

SAT-ano 61

**Konservu la mapon kaj kunportu ĝin al la kongreso. Vi ne ricevos duan en Dortmund.**

Presita en Germanio ĉe J. H. Schmalfeldt & Co., Bremen


**HOESCH AG DORTMUND**



NIAJ ENTREPRENOJ: Altenessener Bergwerks-AG Essen-Altenessen - Hoesch Bergwerks-AG Dortmund - Hoesch-Westfalenhütte AG Dortmund - Hoesch Walzwerke AG Hohenlimburg - Zweigniederlassung Werk Federstahl Kassel - Dörken AG Gevelsberg i.W. - Dortmunder Drahtseilwerke GmbH Dortmund - Schmiedag AG Hagen i.W. - Zweigniederlassung Werk Ruegenberg Olpe i.W. - Schwinn AG Homburg (Saar) - Trierer Walzwerk AG Wuppertal-Langerfeld und Trier - Maschinenfabrik Deutschland AG Dortmund - Hoesch Rohrwerke AG Hiltrup und Hagen i.W. - Becke-Prinz GmbH Dortmund und Hemer - Rheinischer Vulkan Chamotte und Dinaswerke mbH Oberdollendorf (Rhld.) - Hoesch Eisenhandel mbH Dortmund - Hoesch Reederei und Kohlenhandel GmbH Essen-Altenessen - Hoesch Düngerhandel GmbH Dortmund - Hoesch Export GmbH Dortmund - Hoesch Limited London - Hoesch Italiana SpA Mailand - American Hoesch Inc. New York - Industriewerke AG Dortmund

PRODUKTPROGRAMO: Karbo, koakso kaj akcesoraĵoj - Ŝtalig- kaj rulproduktaĵoj ĉiuspecaj, varme rulpremitaj, malvarme rulpremitaj kaj tiritaj - Form- kaj stangoŝtalo - Kvalitŝtaloj - Aŭtomatoŝtalo laŭ la konataj Hoesch-Aŭtaxkvalitoj, nigra kaj blanka - Surtera fervoja materialo - Ŝtalbariloj - Tiritaj fer- kaj ŝtaldratoj ĉiuspecaj - Risortoj ĉiuspecaj - Forĝitaĵoj kaj premitaĵoj ĉiuspecaj por la veturilkonstruado, por konstruilaro, por minej- kaj maŝinkonstruado - Fergisaĵo ĝis 3 tunoj - Speciala gisaĵo - Globa Grafitgisaĵo - Muelujoj - Drat-plektaĵoj kaj -retoj - Dratŝnuroj - Malvarme rulita lado ĉiukvalita kaj ĉiuspeca kaj en ĉiumaniera kvalitaltigo surfaca - Larĝbendoj en rulformo ĝis 1330 milimetra larĝeco - Kruda kaj mezkruda ladoj - Ĝenerala lado malkruda - Kvalitlado malkruda - Velditaj tuboj por gaso, akvo kaj oleo - Velditaj boligtuboj - Velditaj altkvalitŝtalaj tuboj - Porelektraj tuboj - Ŝtaltubaj lummastoj - Duflanke velditaj Hoesch-spiraltuboj - Leviloj - Koaksfarejmaŝinoj - Relkomutiloj kaj krucreloj ĉiuspecaj - Laborilmaŝinoj plej altkapablaj ĝis la plej kolosa konstruformo


## Lastaj komunikoj

**La komunloĝejoj** troviĝas en jenaj lernejoj (verdkolore markitaj en la mapo) numeritaj nord-suden: **(1)** Oesterholz-lernejo (atingebla de la kongresejo en 15 minutoj) — **(2)** Elsa-Brandström-lernejo (20 minutoj) — **(3)** Uzina gastejo (25 minutoj) — **(4)** Socialakademio (25 minutoj).

**Malfrualiĝintojn** ni devas loĝigi en: **(5)** Uzina gastejo troviĝanta en la antaŭloko Hörde (vidu mapon malantaŭa paĝo). La malavantaĝon de pli longa distanco (15-minuta tramveturdo) kompensas senpaga matenmanĝo ricevota en tiu komunloĝejo.

**La loko por starigi propajn tendojn** troviĝas en la sport- kaj refreŝiĝparko Hoesch apartenanta al la uzino Westfalenhütte (blukolore markita).

**La geknaboj** loĝos en la junularhejmo en la antaŭloko Brackel (vidu mapon malantaŭa paĝo). La tranoktado, restado kaj ĉiuj aranĝoj (aŭtobusaj veturadoj ktp.) estas senkostaj. Krom tio ni laŭpove kontribuos malaltigi la kostojn por la manĝado.

**La kongresejon** (Fritz-Henssler-Haus) ni markis per ruĝa koloro.

**La poŝtoficejo** troviĝanta en la kongresejo dejoros lundon, mardon, merkredon kaj vendredon je la 8-a ĝis la 12-a horo (ĝi aplikos kongresstampilon).

**Pri vizitoj** kaj ceteraj aranĝoj atentigos nigra tabulo starigota en la kongresejo.

**Informon pri fervoja rabato** sur germana teritorio donas la koncernaj lokaj trafikoficejoj.

**Krom la kostoj** por la aŭtobusaj veturadoj de la duon- kaj tuttaga ekskursoj (la prezon ni momente ankoraŭ ne povas fiksi) kaj la enirbileto por la ĝardenkultura ekspozicio validanta 3 sinsekvajn tagojn (2,— gmk.) neniaj ceteraj elspezoj estos postulataj, kondiĉe, ke vi pagis viajn kongreskotizon kaj restadkostojn.

O.K.K. Dortmund